# RETKOMUNIKOJ 5/2009

ĈEA-retkomunikoj estas neregula informilo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio sendata al ĉiuj rete atingeblaj membroj de ĈEA kaj ankaŭ al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri la Esperanto-movado en Ĉeĥio. Ĝi neniam enhavas aldonaĵojn. Se vi tamen ne volas ricevadi ĝin, sufiĉas respondi per simpla "ne sendadu" kaj ni tuj eligos vin de la dissendolisto.

ENHAVO:

1. BARDO SEN BARBO EN LA ĈEA-KONFERENCO EN SVITAVY
2. LA 3-A POSTFERIA RENKONTIĜO EN NETOLICE
3. InPaSem SENPERE POST LA ĈEA-KONFERENCO
4. NOHAVICA EN ESPERANTO
5. TRADUKSEKCIO FONDATA
6. ĈEĤA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS. (oficiala organo de ĈEJ redaktata de Marek Blahuš)
7. KALENDARO DE ESPERANTO-ARANĜOJ EN ĈEĤIO AŬ ORGANIZATAJ DE ĈEĤIO

## 1. BARDO SEN BARBO EN LA ĈEA-KONFERENCO EN SVITAVY

Estas ĝojige povi anonci, ke dum la ĈEA-konferenco en Svitavy de la 9-a ĝis la 11-a de septembro la partoprenantoj havos bonŝancon konatiĝi kun la arto de populara "Bardo sen barbo" Georgo Handzlik. Li prezentos teatraĵon "Ludoviko-Lazaro" kaj krome kantos kelkajn kantoj el sia ŝatata repertuaro. Ne preterlasu tiun bonŝancon!
Krom Bardo sen barbo atendas la partoprenantojn pliaj valoraj programeroj, inter ili ekzemple prezento de jubilea DVD, eldonatan omaĝe al la kvardekjariĝo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio.

Plia ĝojiga anonco por tiuj, kiuj ankoraŭ ne aliĝis estas, ke la komitato de ĈEA decidiĝis forŝovi la unuan periodon, kiam la kotizo plej malaltas, ĝis la 15-a de septembro, do ne hezitu kun la aliĝo.

Por tiuj, kiuj ne volas mistrafi la eksterordinarajn balotojn en la parlamenton en la kazo, ke ili vere efektiviĝos laŭplane, jen la klarigo kiel procedi por povi baloti en Svitavy: vian balotlegitimilon vi povas depreni en via Urba aŭ Loka Oficejo ekde la 24-a de septembro, sed necesas pli frue skribe aŭ persone peti ĝin. Tio povas okazi ĝis plej malfrue 7 tagojn antaŭ la balotoj, do ĝis la 2-a de oktobro.

Pliaj informoj kaj aliĝiloj ĉe www.esperanto.cz aŭ tomecek@esperanto.cz. Vi povas ankaŭ aliĝi rekte interrete ("online") ĉe www.esperanto.cz/Svitavy2009

## 2. LA 3-A POSTFERIA RENKONTIĜO EN NETOLICE

Ne hezitu ankoraŭ aliĝi al la 3-a POSTFERIA RENKONTIĜO EN NETOLICE 11.-13.9.2009. Eblas partopreni ankaŭ nur sabate, kiam okazas la ĉefa programo!

Ĉiĉerona tradukseminario kaj unika vizito de renesanca kastelo Kratochvíle en akompano de Petro Vok kaj kun renesanca muziko,
kantvespero. Detala invitilo kaj aliĝilo en www.esperanto.cz aŭ ĉe Turk.V@seznam.cz

## 3. InPaSem SENPERE POST LA ĈEA-KONFERENCO

Internacia Paroliga Semajno okazos en Dobřichovice apud Prago senpero post la ĈEA-konferenco (de la 12-a ĝis la 18-a de oktobro), kio donas bonŝancon precipe al eksterlandaj partoprenantoj ĉeesti ambaŭ aranĝojn. Kiel tradicie, la kurson por komencintoj gvidos ŝatata ĉe-metoda instruisto Stano Marček, krome estos seminario(j) por jamaj parolantoj, kiuj volas perfektiĝi. Oni antaŭtagmeze lernos, dum posttagmeze kaj vespere estos turismaj kaj kulturaj programoj. Sabate la 17-an de oktobro posttagmeze okazos tradicia renkontiĝo de la InPaSemanoj kun aliaj ĉeĥaj esperantistoj al kio ĉiuj esperantistoj estas kore invitataj. Pli da informoj kaj aliĝiloj ĉe www.kava-pech.cz/inpasem aŭ chrdle@kava-pech.cz

## 4. NOHAVICA EN ESPERANTO

Oficiala retpaĝaro de Jarek Nohavica enhavas apartan rubrikon kun Esperanto-tradukoj de liaj kantoj tradukitaj de Georgo Handzlik, kiu ankaŭ ofte prezentas ilin dum siaj koncertoj. Vidu www.nohavica.cz – klakinte al ĉeĥa flageto, en la rubriko „Překlady“ klaku al ESP. Oftaj vizitoj de la paĝoj kaj favoraj retmesaĝoj konvinkos la retmastrumantojn pri ekzisto de E-publiko. Bv. plusendi la informon kaj rekomendi al viaj geamikoj!

## 5. TRADUKSEKCIO FONDATA

Dum la aranĝo en Netolice estos fondita sekcio (laborgrupo) por E-tradukantoj, celanta kunordigi tradukprojektojn, reciproke subteni sin per konsultiĝoj kaj lingvorevizioj, krei komune lingvohelpilojn (fakvortaretojn, ekzercarojn ktp.).

La ĉefa aktuala grupeto okupiĝos pri ĉiĉeronaj aŭ ĝeneralaj turismaj tekstoj, sed tradukantoj de beletro kaj aliaj fakaj tekstoj estas same bonvenaj! Sukceso de la grupo dependos de aktiveco de ĉiuj el ĝiaj membroj. Membreco en ĈES ne estas kondiĉo.

Portempa kunordiganto estas Pavla Dvořáková el Písek.Interesiĝantoj bv. anonciĝi ĉe traduko@esperanto.cz

## 6. ĈEĤA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS
(OFICIALA ORGANO DE ĈEJ redaktata de Marek Blahuš)

Ĉeĥa Esperanto-Junularo okupiĝas pri postlaboroj rilataj al la sukcesa 65-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) de TEJO, okazinta inter la 18-a kaj la 25-a de julio 2009 en Liberec'. Laŭ oficialaj nombroj partoprenis

ĝin 343 esperantistoj el 41 landoj. La internacian organizan teamon konsistigis 24 personoj, precipe ĉeĥoj, germanoj kaj poloj. Rimarkinde estas, ke la meza aĝo de organizanto estis 24 jaroj.

Post la kongreso (samkiel antaŭ ĝi), pluraj eksterlandaj esperantistoj ankoraŭ vizitis aliajn ĉeĥajn urbojn (Prago, Brno). Reveninte hejmen, ili afiŝis en la interreto siajn fotojn kaj kelkaj eĉ verkis entuziasmajn raportojn. Aldone, speciala granda kolekto de fotoj kaj videoj estos baldaŭ kunlabore kun TEJO rete disponigita laŭ libera permesilo, do facile kaj laŭleĝe plu reuzebla, ekz. por esperanistaj celoj. La kolekto de amaskomunikilaj mencioj pri la IJK jam ampleksas 33 erojn. Ankoraŭ nun, ĝis la 9-a de septembro, la ĉeĥa televido TV NOE ade elsendas erojn de la filmet-serio "Esperanto estas..." kreita de E@I, en ĉeĥa dublado aranĝita de ĈEJ.

Ĉiuj menciitaj eĥoj (fotoj, videoj, raportoj, amaskomunikiloj) pri la 65-a IJK en Liberec' troveblas ĉe http://ijk.esperanto.cz/eo/Ehxoj/

Atentu, ke Marek BLAHUŠ, la redaktanto de tiu ĉi organo, kiu dum la IJK estis elektita komisiito de TEJO pri reta agado, estas nuntempe malfacile atingebla pro banala sed kelksemajna enhospitaligo.

## 7. KALENDARO DE ESPERANTO-ARANĜOJ EN ĈEĤIO AŬ ORGANIZATAJ DE ĈEĤIO

11.-13.9.2009: Postferia renkontiĝo en Netolice. Inf.: www.esperanto.cz aŭ Turk.V@seznam.cz <mailto:Turk.V@seznam.cz>

12.9.2009: Ekskurso al Moravia karsto (kun partopreno el CZ, AT, SK). Inf.: Mirek Hruška <miro.volny@centrum.cz>

9.-11.10.2009: ĈEA-konferenco en Svitavy. Inf. www.esperanto.cz aŭ tomecek@esperanto.cz

11.-18.10.2009: Internacia Paroliga Semajno InPaSem en Dobřichovice apud Prago, inf.: www.kava-pech.cz/inpasem aŭ info@kava-pech.cz

22.-25.10.2009: Lingva seminario en Skokovy (Belega pejzaĝo de Bohemia Paradizo, do konvena ankaŭ por tiuj, kiuj volas ripozi inter esperantistoj sen partopreni la lernadon). Inf. kaj aliĝiloj: Jindřiška Drahotová, drahotova@esperanto.cz

12.12.2009 Antaŭkristnaska Renkontiĝo (AnkRo) en Písek inkl. ĉeĥlingvan simpozion celatan publikon pri la personeco de d-ro L.L.Zamenhof. Inf.: pisek@esperanto.cz

2.-4.4.2010: La 4-a Sabla Printempo. Komuna aranĝo de ĈEA, ĈEJ kaj E@I. Trejnseminarioj kaj prelegoj pri diversaj temoj  kadre de „Esperanto kaj Interreto".Samtempe solena inaŭguro de ekspozicio pri Esperanto en Urba biblioteko.Aliĝoj kaj pliaj informoj ĉe: pisek@esperanto.cz <mailto:pisek@esperanto.cz>

2010-06-20: Tradicia renkontiĝo de ĉeĥaj, polaj kaj slovakaj esperantistoj sur la pinto de la monto Ĉantorio. Inf.: suchanekj@seznam.cz

11.-24.7.2010: Flugkaravano al Kubo (UK en Havana, kun turisma ekkona antaŭkongreso). Info: chrdle@kava-pech.cz

Ĉu vi ne trovis vian aranĝon ĉi tie? Ne kulpigu nin, sed vin mem kaj sendu la informojn al la redaktanto de ĈEA-retkomunikoj chrdle@kava-pech.cz